# TEA-BULTENO

3ª JARO — OKTOBRO 2000 — NUMERO 10

## AGENDO

| | | |
|---|---|---|
| **1** | **D** | |
| 2 | L | |
| 3 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 4 | M | |
| 5 | Ĵ | |
| 6 | V | Kristana kaj juda versioj de islama legendo |
| 7 | S | **AGOTAGO** |
| **8** | **D** | |
| 9 | L | |
| 10 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 11 | M | |
| 12 | Ĵ | |
| 13 | V | Pri TRIESTO 2001 |
| 14 | S | |
| **15** | **D** | |
| 16 | L | |
| 17 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 18 | M | |
| 19 | Ĵ | |
| 20 | V | El Esperanto-Gazetaro |
| 21 | S | |
| **22** | **D** | |
| 23 | L | |
| 24 | M | Ordigo de Tea-arkivo |
| 25 | M | |
| 26 | Ĵ | |
| 27 | V | Pri la 85ª UK en Tel-Aviv |
| 28 | S | |
| **29** | **D** | |
| 30 | L | |
| 31 | M | Ordigo de Tea-arkivo |


## Vortoj de la redakcio

Tre verŝajne jam vi scias kaj konscias, ke jaro 2001 estos tre grava jaro por ni triestanoj pro la okazigo en nia urbo de la 70ª Itala Kongreso de Esperanto. Tamen same gravas la nuna jaro, dum kiu komenciĝis la preparlaboroj: buntaj varbiloj kun aliĝilo estis disdonitaj al la kongresanoj en Telavivo kaj al la italoj en Casalecchio (dum la Itala kongreso estis prezentita ankaŭ videofilmo pri Triesto), dum en interreto dulingvan paĝaron vi povas esplori ĉe la adreso: www.members.xoom.it/verdastelo - tio rilate al propagando.

Intertempe Lkk kontaktis urbestraron, turismajn instancojn, skabenojn pri kulturo de provinco kaj regiono ktp ktp, prezentante programon kaj planojn pri nia kongreso. La reagoj ĝis nun estas sufiĉe pozitivaj kaj bonesperigaj, kio stimulas nin intense labori por aranĝo vere altnivela. Jam decidita kaj mendita la kongresejo, nome Triesta Kongresa Centro lokita ĉe Marstacidomo: do, vere inda scenejo, ĉu ne?

Kion - kvarvorte - mi rakontis al vi, estas nur tre konciza resumo, kiu kaŝas malantaŭ si horojn, tagojn kaj semajnojn de intensa laboro. Certe nun vi pensos: «Jen la kutima gurdado: nun venos plendoj kaj alvokoj je kunlaboro!» Jes, vi pravas: fakte lasta celo estas ĝuste iom instigi ankaŭ vin al kunagado, al aktiviĝo por sukcesa realigo de la unua itala kongreso de la 3ª jarmilo. **Ni atendas vin**, ankaŭ por pli detale priskribi niajn unuajn paŝojn, kio estis farita ĝis nun, kiel ni faris ĝin - eble, per via helpo, ni estus povinta ĝin fari pli bone, certe ankaŭ vi havas bonajn ideojn kaj konkretajn sugestojn - do, kial ne eksterigi ilin? Kial ne sin proponi? Ĉiumonate, kaj certe ankaŭ pli ol unu fojon monate, ni kunsidos por pridiskuti la diversajn erojn de la programo, por pristudi kiu faros kion, por informi pri la lastaj rendevuoj kun la urbaj, provincaj kaj regionaj instancoj, ktp ktp. Antaŭ ni staras monatoj da laboro kaj ni certas, ke **ankaŭ vi estos kune kun ni**! Dankon!

**Ni bezonas ankaŭ vin!**



## 12ª ALP-ADRIA ESPERANTO-KONFERENCO
## Ptuj: 22-24.9.2000

***Enkonduka parolado de Edvige Ackermann, ĝenerala sekretario de Alp-Adriaj Konferencoj***

# ESPERANTO KAJ TURISMO

Karaj konferencanoj, geamikoj,

La temo ĉi-jare estas tre simpla, preskaŭ banala. Ĝi kunigas du elementojn, esperanto kaj turismo, kiel se la afero estus tute normala, evidenta kaj konsekvenca.

Ekde praa epoko, kiam unuan fojon du diverslingvaj homoj renkontiĝis, ekzistis lingva problemo. Diversaj solvoj estis provitaj, sed preskaŭ ĉiuj bazitaj sur la deviga uzo de la lingvo de la plej potenca grupo. Tiel estis kun la latina lingvo, kun la franca de la kortumoj kaj diplomatoj, kun la rusa en kelkaj partoj de la mondo ĝis antaŭ nelonge, kun la angla de la Brita Imperio kaj nun kun la angla/usona de la ekonomio, sciencoj kaj novaj teknologioj - lingvoj altrudataj en diverstipaj procezoj.

Aranĝoj, seminarioj, kongresoj, kongresetoj, konferencoj, kunvenoj, kunloĝadoj, ktp ktp, tra ĉiuj landoj kaj kontinentoj allogas kaj vokas nin al partopreno. Kaj malantaŭ seriozaj temoj kaj altnivelaj prelegoj, kunsidoj kaj rezolucioj, ĉu vi scias kio kaŝiĝas, kio estas la plej grava programero?

Turismo. Sed kio estas turismo?

La nocio pri turismo diras al ni, ke temas pri "spacmoviĝado, vojaĝado, vizito de loko" kaj ke oni povas tion fari cele al "ripozo, kuracado, studado, sporto, verkado, konatiĝo kun kutimoj, kulturo, lingvo de iu popolo, konferencado, religiumado", sed ankaŭ pro laboraj kialoj.

Vojaĝado estas malnova kiel la homo mem, sed en la 20ª jarcento ĝi evoluis ĝis dimensio eksterordinara. Statistikoj diras, ke en la jaro 1970 turismis 240 milionoj da homoj, kaj en 1986, 350 milionoj, kaj el tio ni komprenas, kia komplika fenomenaro ĝi estas. Sociologio abunde okupiĝas pri ĝi, ĝiaj ekonomiaj kaj evolu-faktoroj, ĝiaj postsekvoj. Internacia turismo en la nunaj dimensioj estas tre ampleksa kaj tuŝas grandan parton de la homaro, sed atentu, nur parton kies rajto vojaĝi ne estas limigata aŭ malhelpata. Kaj malgraŭ ke la Deklaracio de Homaj Rajtoj agnoskas la rajton de ĉiu vojaĝi, eliri el kaj reveni en sian landon, ni bone scias ke multaj ne povis, kaj ankoraŭ ne povas, plene aŭ entute profiti kaj uzi la rajton.

Mi ne demandos "Kio estas Esperanto", ni ĉiuj bone scias tion, kvankam kelkfoje la respondo havas variantojn. Esperantistoj, ekde la plej fruaj jaroj, estis vojaĝemaj, scivolemaj pri la mondo kaj ĝia loĝantaro; cetere se ili volis tiam sperti la uzeblecon de la internacia lingvo Esperanto, ili devis vojaĝi. Tiam ne ekzistis aliaj metodoj, krom korespondado kaj legado, kio tamen ne sufiĉis, pro la demando "Ĉu ni, parolante, povos interkompreniĝi?"

La esperantistoj, konstatinte ke Esperanto bone funkciis, komencis utiligi ĝin precipe por turismado. Ni bone scias kiom da eblecoj ĝi nuntempe ofertas: sufiĉas okulumi al la kalendaro preparita de la hungara revuo EVENTOJ, por noti kiom da okazoj oni povas ekspluati por viziti kaj koni la mondon.

Ni ne forgesu ke inter la plej gravaj kaj interesaj eltrovaĵoj de la esperantistoj, estas PASPORTA SERVO, per kiu oni povas turismi tra sepdeko da landoj en ĉiuj kontinentoj, per limigitaj financ-rimedoj kaj kun ebleco sperti la vivon en la lando vizitata.

Malmultaj lingvoj, por ne diri "neniu", permesas samajn spertojn kaj donas tiajn ŝancojn.

Ofte iu asertas: pere de la angla vi povas vojaĝi ĉie senprobleme. Oni devas interkonsenti pri la signifo de la vorto «vojaĝi». Se temas pri transportado, verŝajne jes, la angla povas sufiĉi: en plejparto de stacidomoj, flughavenoj, marhavenoj, tiu ĉi lingvo estas uzata senrezerve kaj eblas interkompreniĝi - se vi regas ĝin. Se temas pri vojaĝo en la senco de vizitado de lando, tiam la problemo fariĝas pli tikla, kaj okazoj interparoli (ne demandi informojn, vere interparoli!) kun enloĝanto preskaŭ ne ekzistas. Esperanto, tute inverse, ne utilos ĉe la stacidomo, ĉe la flughaveno, sed permesos la fundan konon de la lando kaj ties loĝantaro, pli personan interrilaton kaj facilan alparolon.

Estas tute klare, ke turismo estas vasta kampo por amasa utiligo de la internacia lingvo. Plia evoluo, precipe de kultura turismo por la larĝaj popoltavoloj, ne estas realigebla sen la helpo de simpla kaj neŭtrala lingvo kiel instrumento de komunikado.

Ja, ni esperantistoj troviĝas en plej favora pozicio. Ni klopodu eluzi ĝin kiel eble plej multe, kiel eble plej profite. Ni indiku la vojon ankaŭ al aliaj, al la nekonsciaj turistoj, kiuj en plej bona kazo malprofitas kulture, home kaj emocie, de iliaj vojaĝoj tra la mondo.

## Rendevuoj en Italio ĝis la fino de la jaro

**07-08.10.2000** - TORINO
Speciala AGOTAGO! Grava Seminario!
f.amerio@libero.it aŭ esperanto.torino@esperanto.it

**05.11.2000** - VILLA DI TIRANO (Valtellina)
Kultur-gastronomia renkontiĝo ĉe *CASA VINICOLA DI VILLA DI TIRANO* por vizito de la vinkelo kaj gustumado, ĉe Farmo *LA GATTA*, de lokaj specialaĵoj. Rendevuo je la 10ª horo kaj tagmanĝo je la 12.30. Sekvos vizito de la vilaĝoj *Villa di Tirano*, *Bianzone* kaj *Madonna di Tirano*. Organizas: CIRCOLO ESPERANTISTA SONDRIESE, via Caimi 44, 23100 Sondrio - tel/fax 0342-213242

**25.11.2000** - BOLZANO
Tago de Esperanto-informoj. Detalojn donas leafabbri@iol.it

**8-10.12.2000** - FRASCATI
Seminario pri Instruado de esperanto en Italio. Informoj: f.esp.it@infinito.it aŭ corsetti@itelcad.it

**10.12.2000** - VERONA
Zamenhof-Tago en Verona, zorge de FERVOJISTA E-GRUPO

**17.12.2000** - TRIESTE
Zamenhofa Tago. Informas: TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
esperanto@retecivica.trieste.it

---

Kiel lingvo, Esperanto ne havas celojn. Aŭ maksimume nur tiun de ĉiu viruso: infekti ĉiam novajn homojn por mem pluvivi.

*Jouko Lindstedt*

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128
Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349